



Estrara Komunikado EKO 2018-08 sendita el Marakeŝo, la 31an de marto.

Al: Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, ILEI-aktivuloj, TEJO-estraro, gazetaroj, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj.

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkröaĵoj kun indiko de fonto: EKO de UEA

Ekis la 11a Mezorianta Kunveno kaj AMO 45

Ekologia vilao liveris naturan ĉirkaŭaĵon por la **11a Mezorianta Kunveno**, kiu ekis en la lasta tago de marto rando de la maroka urbo **Marakeŝo**, kaj kadre de ĝi la **45a Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO)**. Komence, la dojeno de la Mezoriantaj Kunvenoj, s-ro **Renato Corsetti**, resumis la progreson aŭ ĝian mankon en deko da landoj tra la regiono de MONA – la Meza Oriento kaj Norda Afriko.

Pri la kvarjara historio de AMO-seminarioj rakontis **Stefan MacGill**; spite mirigan tutmondiĝon, 25 el la 45 seminarioj tamen okazis en Eŭropo. Rimarkinde, ene de la komencaj naŭ monatoj de la vivo de AMO, la programo jam atingis 4 el la 5 kontinentoj. Alvenis en tiu momento tri marokaj esperantistoj, do la kunvenintoj aŭdis raporton de **Mohammed Hakki** pri la nuna agado, kaj pluiris al manieroj kuraĝigi la agadon. Konkludoj: *ege helpos la fondo de du/tri urbaj kluboj, kiuj permesus kontaktadon enlande kaj ankaŭ translime; partoprenintoj el Hispanio kaj Francio indikis entuziasmon partopreni en tio.*

Post paŭzo, aperis la sola partoprenanto el subsahara Afriko, s-ro **Assanye Faye** (sur la foto), la prezidanto de la landa asocio en Senegal, kiu atingis la kunvenon per obstakloza 4-taga busvojaĝo. Vojaĝo pli longa sed iom malpli defia estis tiu de 39 bravaj esperantistoj kiuj karavane odiseis trajne dum 12 tagoj de Sankta Peterburgo tra Moskvo, Irkutsk kaj Vladivostoko por partopreni la 102an UK en Seulo. Rakontis pri tio per bildoj **Tatjana Loskutova**, (sur foto en la sekva paĝo) multvojaĝanta instruistino.



La posttagmeza programo riĉis je kulturo kaj historio. **Mirejo Grosjean** prezentis ilustritan promenon tra la labirintoj de limoj plej diversspecaj. Komence temis pri landlimoj, poste pri metaforaj kaj psikaj limoj, kiuj ofte dependas de kulturaj prijuĝoj aŭ antaŭjuĝoj. La posta prelego revenigis nin al la okcidenta Magrebo, kun skizo de ĝia komplika historio tra dudeko da jarcentoj. Fermis la sesion **Annie Grente** per paroliga ekzerco sekvata de defia tasko pri komprenado de filmo pri Leo


Africanus, kun dek demandoj respondendaj ene de tri grupoj. La unuan tagon kronis **teatra spektaklo *La kredito*** interpretita de Sasha Pilipovic kaj Georgo Handzlik.

Pretigita en la 31a de marto 2018. **Stefan MacGill / Renato Corsetti.** Vortoj: 346



Supre:
aŭskultantoj
el Maroko,
Belgio, Rusio
kaj Svislando.

Sube: bazaro
de suveniroj,
bazaro de
fiŝoj.



Ĉi tiu komunikilo estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj ĉe: <http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado>

ALDONU VIN: Skribu al <stefan.macgill@eo.net>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, volapukistoj ktp.

SUBTRAHU VIN: Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedlistoj.